MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 11

Novembro 2023 Kol. 461/39

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Festo de E-o en Svitavy; Mesaĝo de UEA; Konferenco de ĈEA; Ekscio pri rezulto; E-o por multlingva Eŭropo; IRIS; Finaj rezultoj el UK; Afrikanoj en Torino; Internacia Kongresa Universitato iras al Afriko

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Komence de la septembro okazis

JUBILEO-FESTO DE ESPERANTO en Svitavy.

La tieloka E-klubo solene rememoris la 90- jariĝon de sia fondo kaj la 15- datrevenon de ekzisto de la E-Muzeo.

La solenaĵo estis nomita „Kunveno en la E-Muzeo Svitavy“, kun inaŭguro de nova ekspozicio „*90 jaroj de la E-klubo Svitavy“*. Feliĉe venis sufiĉe multaj vizitantoj, do la okazo estis vere digna.

Vendrede antaŭvespere, la 8-an de septembro, komenciĝis la kunveno per komuna vespermanĝo en la ŝatata restoracio Astra. En bela salono de la muzeo okazis teatraĵ-prezento de studenta ensemblo DOMA - *Ludetoj kun diablo*; kaj *Reĝo Lávra* (ĉeĥaj humur-klasikaĵoj). La

studentoj, sub gvido de sia reĝisorino, profesorino Radka Oblouková, prezentis perfektan teatraĵon. Ili havis per ĝi grandan sukceson en la 108-a UK en Torino.

Post la prezentaĵo sekvis programo en ĉambro de la muzeo per prelego kun lumbildoj de Jakub Heřmanský – *Vojaĝo per ŝipo* (fakte tio estis kelketaĝa ŝipego) ĉirkaŭ Norvegujo, inkluzive viziton en kelkaj urboj kaj naturbelaĵoj. Interesa prelego, rakontado *(en la ĉeĥa),* belaj bildoj.

Sabate, la duan tagon de la kunveno, okazis en la muzeo inaŭguro de la jubileo-koncerna ekspozicio kaj kelkaj prelegoj. La estrino de la E-klubo, Libuše Dvořáková, komence tralegis salutvortojn de amikeca Ĉina E-Asocio, kaj poste ŝi parolis pri la historio de la Esperanto-klubo kaj de la E-Muzeo. La Esperanto-vivo en la urbo estis kaj estas vere riĉa. La ĉeestanta urbestro dankis al sinjorino Dvořáková pro fruktodona agado de la E-klubo kaj transdonis al ŝi bukedon.

(Mi mem trarigardis en tabla vitrofenestro memoraĵojn pri mia patro Linhart, iama longjara estro de la E-klubo. Mi rememoris, kiel en la 1960-aj jaroj oni unu dimanĉon en monato aranĝis kunvenojn de najbaraj E-rondetoj – Svitavy, Litomyšl, Česká Třebová, Polička en unu el tiuj ĉi urboj. Foje mi kaj mia frato eĉ „aktoris" kun programero „Ruĝa Ĉapeto". Kiom da tempo jam pasis! Kiom da esperantistoj kunvenadis! L.Ch.) La veninta programero estis lanĉo de la libreto „En la muziko estas la vivo

de Ĉeĥoj", *konciza, perfekta rakonto pri la muzik-historio,* kun honora ĉeesto de la aŭtoro Jan Duda; prezento de novaj libroj el la eldonejo KAVA/PECH (pere de Petr Chrdle); Jindřiška Drahotová poste prezentis amplekson da libroj de sia traduk-agado (ĉirkaŭ 30). *(La admirinda rezulto okaze de ŝia 85-a naskiĝjubileo, en la ĉi-jara novembro. Kaj nia GRATULO!!!)*

Daŭrigis la programo en la muzeo per prelegoj pri Komenio kaj

Zamenhof (fare de P. Chrdle), pri historio de Esperanto en Slovakio ĝis la jaro 1935 (tralegis – Pavol Petrik) daŭris la evento post tagmeza paŭzo. Fine estis prezento de nova TTT-paĝaro – elektronika domajno de nia Muzeo (Josef Kalčík kaj Jiří Tomeček), kiu ebligos pli efikan agadon sur la kampo de kontaktoj. La sabata vespera kaj dimanĉa programoj estis plene en la manoj de la amiko Jiří Altior. *(Sub aŭspicio de la Instituto por Revivigo de Kultura Nacia Heredaĵo – ĉikaze koncerne Esperanton)*.

La programo estis daŭrigita sur la podio en la salono de Ruĝa biblioteko. Damian Altior jr. preparis teo-trinkaĵon laŭ la ĉina tradicio, s-ro Altior parolis pri la Instituto kaj deklamis kelkajn E-poemojn de iama eminenta esperantisto el Pardubice, doktoro Stanislav Schulhof (en sia ĉeĥlingva traduko), Beata Altior kaj kunkantistoj kantis esperante. La kompono de programo montris ilian seriozan intereson pri Esperanto danke al la arta nivelo.

Dimanĉe, la lastan tagon de la solenaĵo, la sinjoro Vladimír Liščák, scienc-akademiano, sinologo, prelegis pri la frato-franciskano Odoriko el Pordenone nomata „ĉeĥa Marco-Polo“, ĉar nur kelkajn jardekojn post la famulo li faris sian misian pilgrim-vojaĝon al la Oriento.
Sinjoro Liščák parole prezentis sian libron pri Odoriko; ĝi fariĝis fundamento por la filmo „Se hurlos la Leono“ (de la reĝisoro Jan Eliáš Svatoš), kiun ni aktuale spektis surloke. Eseoforme ĝi prezentas la temon: dialogo inter la reĝo Přemysl Otakar la 2-a („la Leono“) kaj la beata Odoriko, monaĥo, (supozeble) de ĉeĥa deveno. La aŭtoroj kiel unuaj prezentis al la ĉeĥa publiko la homon, kiu meritas nian historio-rememoron.
Dimanĉe posttagmeze, en reĝisorado de sinjoro Altior, okazis koncerto en la baroka preĝejo. Muzikis kaj kantis (ankaŭ esperantlingve) virina-ensemblo (sub gvido de Beata Altior) kaj vir-ensemblo (sub gvido de Stanislav Mistr), ambaŭ el Prago; sole kantis sinjorino Beata Altior. Eble la plej emocia estis la E-himno La Espero. La koncerto estis grandioza kulmino de la tuta JUBILEO-FESTO DE ESPERANTO en Svitavy. La tuta aranĝo estis tre bela, sukcesa, ĉefe danke al la anoj de E-klubo kaj sinjoro Altior kaj la subteno de urbaj funkciuloj.

L. Chaloupková, M. Turková

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE PLIAĜULOJ, 1 OKTOBRO 2023

Maljuniĝo de la tutmonda popolo estas neŝanĝebla tendenco, interalie pro gigantaj antaŭenpaŝoj de la medicina scienco. Plena respekto de homaj rajtoj inkludas specialan atenton al specifaj grupoj. Pro tio, en 2023, ni pripensas la universalajn homajn rajtojn por pliaĝuloj.

La momento gravas, ĉar la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj mem 75-jariĝas, ek de sia lanĉo en 1948. Mondo kie ĉiuj plene ĝuas la samajn rajtojn eblas nur per forta solidareco inter generacioj. Necesas novaj sindevigoj de la tuta socio, por vera protekto de rajtoj por nuntempaj kaj estontaj generacioj de pliaĝuloj. La homaj rajtoj estas por la tuta vivo, sed necesas specialaj klopodoj en ĉiu vivperiodo. Registaroj devas konstrui intergeneraciajn modelojn por protekto de homaj rajtoj. Por konstrui tion, necesas alproksimigi generaciojn kaj aŭskulti ankaŭ la pliaĝulojn.

Kiam ni parolas pri interkompreniĝo kaj aŭskultado, lingvoj gravas. Multfoje, pliaĝuloj estas portantoj de lingvaj trezoroj, ĉu specifaj endanĝerigataj lingvoj, ĉu variaĵoj de naciaj lingvoj. Fakte, pliaĝuloj estas vivaj informiloj pri kulturaj kaj lingvaj ŝanĝoj. Esperanto estas pontolingvo, ne nur en plej evidenta senco inter malsamlingvanoj, sed ankaŭ per la Esperanto-komunumo, inter malsamaj generacioj. Esperantujo proponas plurajn eblecojn al ĉiuj riĉigi sin per novaj scioj pri landoj, kulturoj, valoroj kaj vivkutimoj; per novaj amikoj ĉirkaŭ la mondo; per novaj eblecoj kunlabori en pluraj kampoj; per novaj okazoj vidi la mondon per nova kunlabora perspektivo – kaj per novaj aliroj por solvi la grandajn mondajn problemojn per kunagado inter ĉiuj popoloj kaj ĉiugeneracioj.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

KONFERENCO DE ĈEA

Ĉi jara konferenco de ĈEA okazis en ĉarma turisma restadejo Prudká ĉe Tišnov, proksime de Brno. La konferenco estis nove 4 taga (28.9.-1.10.), do la ĉeestantoj povis sufiĉe longe ĝui restadon en pura naturo, renkontiĝon de geamikoj, ekskurson al „ĝardena fervojo“ en urbeto Drásov, viziton de kastelo

Pernštejn, promenon al proksima malnova ligna ponto, societan vesperon kun bela muziko, danco kaj tombolo kaj kompreneble fruktodonan traktadon de anara kunveno.

Dum la kunsido de anoj de ĈEA oni pritraktis kelkajn gravajn temojn – krom la kutimaj temoj (agado de komitato de ĈEA, mastrumado, agado de E-kluboj, informo de ĉefa delegito por UEA,

prezento de loko de venontjara konferenco, novaj libroj de eldonejo KAVA-PECH, de Jindřiška Drahotová, nove de slovaka eldonejo Espero, …), oni parolis pri intenco organizi 110-an UKon en Ĉeĥa Respubliko en la jaro 2025, konkrete en urbo Brno. Ĉeestis Peter Baláž, gvidanto de grupo, kiu respondecas pri organizo de UKoj. La komitato planas krei novan TTT-programon por E-Muzeo en Svitavy, modernigi retpaĝojn de ĈEA kaj plenumi plurajn aliajn planojn.

Nove estis ebleco por ĉeestantoj esprimi sian opinion pri agado de ĈEA estontece. Estis temoj por pripensi – kion faru ĈEA en pluaj jaroj, kion ĝi ne faru, en kio ĝi estis sukcesa ...Krom tio oni ricevis demandilon koncerene aranĝo de E-konferencoj.

La taga programo estis riĉa, sed ankaŭ vespere estis ebleco okupiĝi interese – oni povis ludi societajn, vortajn tablo-ludojn, kanti ĉe gitaro, spekti informojn kun lumbildoj pri ĉi jara UK en Torino, prezenton de 25jara riĉega agado de E-mental´, provi novan ludon (kiun alportis slovakaj gastoj) „Vortoj – moviĝu kaj lernu“ ...
Oni povas diri, ke la konferenco estis vere sukcesa – krom la serioza programo okazis amuzaj enmetaĵoj kaj ankaŭ, kio estas grava: komforta loĝigo, bongusta manĝado kaj bela vetero! Povas bedaŭri, kiu ne venis!

L. Chaloupková

Ekscio pri rezulto post multaj jaroj

En la jaro 2022 la praga Esperanto-klubo festis la 120 jaron de sia ekzisto. Kiel membro de la klubo mi partoprenis kaj kontribuis per prelego pri la vivo kaj verko de Eli Urbanová, nia fama kunklubantino, ĉar ŝi havis eĉ du gravajn jubileojn: 100 jarojn post la naskiĝo, 10 jarojn post la forpaso.
La duan tagon, kiam mi ĉetabliĝis, restis apud mi libera loko kaj venis al mi nekonata juna viro kaj demandis, ĉu li povas apudiĝi. Li prezentis sin al mi kiel Adam Káva kaj mi al li, sed li interrompis min dirante, ke li min konas kaj li venis precipe, por ke li povu renkontiĝi kun mi. Sekve li rakontis en flua Esperanto, ke li ĉeestis mian prelegon pri Esperanto antaŭ 15 jaroj en gimnazio dum la Eŭropa tago de la lingvoj. Kaj ke ni post la prelego parolis kaj ke mi eĉ donacis al li mian lernolibron *Esperantem za tři měsíce*. Kaj ke li laŭ ĝi vere lernis Esperanton, sed hodiaŭ li la unuan fojon parolas en ĝi kun alia viva esperantisto, antaŭe li uzis ĝin nur pasive en la reto. Kia bela surprizo de mi, trovante post 15 jaroj rezulton de mia iama prelego!

Tio rememorigis min pri alia pli frua ekscio pri la frukto de la sama lernolibro. Ni longe estas amikoj kun Petro Baláž, nun prave konsiderata unu el la plej famaj esperantistoj en la mondo. Sed neniam ni babilis pri niaj esperantistiĝoj. Do kia estis mia surprizo, kiam mi aŭdis lin dum lia prelego en la Esperanto-muzeo en Svitavy diri, ke li ellernis Esperanton vere dum tri monatoj lasante sin gvidi per la lernolibro de la ĉeestanta Petro Chrdle, *Esperantem za tři měsíce* (per Esperanto post tri monatoj). Nu, ĉu io povus pli plezurigi la aŭtoron de la lernolibro, ol se laŭ ĝi konatiĝis kun Esperanto tiu Esperanto-famulo?! Mi nur bedaŭras, ke tion ne ĝisvivis mia edzino kaj kunaŭtorino Stanjo. Cetere, li ankaŭ eldonis la slovakan version de la pli ampleksa versio de ĝi *Esperanto od A do Z* (Esperanto de A ĝis Z) en traduko de Katarína Nosková en sia eldonejo Espero.

Amike salutas ĉiujn Petro Chrdle

Esperanto por multlingva Eŭropo

EEU, helpe de Emilio Cid, kreis novan version de siaj retaj paĝoj, ĉefe por povi informi pri esperanto per la helpo de Guglo. La fina celo estas informi eŭropanojn pri esperanto pere de la kampanjo "Esperanto por multlingva Eŭropo", https://uea.org/vikio/Multlingvismo-esperanto . Nun ni bezonas helpon por traduki mallongajn tekstojn troveblajn en tiu paĝaro al eŭropaj lingvoj, ĉefe en la paĝoj
https://europo.be/eo/pri-europa-esperanto-unio/
https://europo.be/eo/europa-himno/
Bonvolu NE komenci traduki sed interkonsenti unue kun renato@esperanto.org aŭcid.emilio@gmail.com.

Transprenita el la EKO 2023 el UEA

LA INTERNACIA RETA INTERFAKA SIMPOZIO (IRIS): 27-30 OKTOBRO 2023

La junulara sekcio de UEA, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), pere de sia komisionoj pri Edukado, Scienco, Kulturo kaj Universitata Agado, denove organizas la Internacian Retan Interfakan Simpozion (IRIS),okazontade **la 27-a ĝis la 30-a de oktobro 2023**: https://www.tejo.org/de/iris-2023.

IRIS okazos kunlabore kun Retoso, la reta evento de TEJO. Ĝi havos du partojn: mallongaj fakaj prelegoj, kiuj estos spekteblaj en jutuba kanalo de TEJO, kaj podiaj diskutoj pri tiuj fakoj dum Retoso.

UEA subtenas la eventon per informado kaj subtenos TEJO-aĝajn kontribuantojn al la ĉi-jara IRIS per senpaga membreco en UEA-TEJO (se ili ankoraŭ tion ne havas) por la jaroj 2023 kaj 2024, inkluzive de aliĝo al la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (https://vk.esperanto.net), kiu okazos post IRIS/Retoso, de la 23-a ĝis la 26-a de novembro 2023. Sendu viajn kontribuojn al IRIS!

Dum IRIS 2021 okazis podiaj diskutoj pri lingvistiko, sociologio, antropologio, internaciaj rilatoj, astronomio, inĝenierarto, biologio, psikologio, matematiko, fiziko kaj fervojoj. La podiaj diskutoj pritraktos aspektojn de la diversaj fakoj surbaze de la ricevitaj videaj kontribuoj, kiuj estos publikigitaj en Jutubo antaŭ la simpozio.

La podiaj diskutoj estos malfermaj al ĉiuj, ĉu membroj ĉu nemembroj de UEA-TEJO, kaj la ligilo por partopreni ilin estos publikigitaj poste. Oni povas nun aliĝi al telegrama grupo de IRIS. Por pliaj informoj, kontaktu la organizteamon ĉe interfaka.simpozio@gmail.com.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Finaj rezultoj el la UK

Al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Torino, aliĝis 1319 personoj el 69 landoj; plej multe el Francio (206), Italio (176) kaj Germanio (108).
Komparante la aliĝnombroj de ĉi-jarcentaj UKoj, ni vidas, ke la Torina UK superis la kongresojn en Bonaero (706 aliĝintoj en 2014), Montrealo (859 en 2022), Hanojo (866 en 2012), Lahtio (917 en 2019), Havano (1022 en 2010), Rejkjaviko (1034 en 2013), Seulo (1195 en 2017) kaj Nitro (1253 en 2016), sed la aliĝintaro al UK-108 atingis nur 59,7% de la aliĝintaro al UK-91, okazinta en Italio (Florenco) en 2006 kun 2209 aliĝintoj.
Al la kongreso venis ne ĉiuj aliĝintoj; ekzemple, el Litovio venis 11 personoj el 13 aliĝintoj, kaj nur unu ruslandano (Moissej Bronŝtejn) el la ses aliĝintoj, sed UEA ne disponigas la statistikon pri la reala nombro da kongresanoj.

El la Ondo de Esperanto, Aleksander Korĵenkov

Afrikanoj en Torino, prepare al UK 2024

Ankaŭ ĉi-jare la tradicia afrika kunveno dum UK okazis hibride en la 1-a de aŭgusto. Partoprenis la kunvenon ĉeeste trideko da kongresanoj kaj ankaŭ homoj defore. Dum pli ol horo estis vicaj atestoj far geamikoj de Afriko subtenantaj projektojn en la kontinento, salutvortoj al la kunveno. Citindas tiu de s-ino Eva Kaluwa, reprezentantino de la tanzania diplomatia domo en Italio. La kunveno grandparte kaj escepte enfokusiĝis pri la Aruŝa UK en 2024. John E. Magessa kaj Costantine Mashauri respektive sekretario kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) anoncis la kolorojn de la venontjara evento en la kontinento. Ili per lumbildoj faris prezentojn pri sia

hejmlando Tanzanio, la lando de la 109-a UK. Iliaj prezentoj kaptis atenton de pli ol unu persono en la salono.
La sukceso de la reta elsendo estis plena merito de Francesco Maurelli. Kvankam la ideo pri hibrida kunveno leviĝis lastminute, li helpis aranĝi kaj persone okupiĝis pri la teknika aspekto. Tiel dank' al li homoj, kiuj pro iuj kialoj kaj aliaj ne povis fari vojaĝon al Torino, povis defore spekti la kunvenon. Vendrede en Torino okazis oficiala prezento pri venontaj UK. Vi rekte de la buŝo de tanzanianoj eksciis pri la venontjara prestiĝa renkontiĝo en Esperantujo. Dume, ni kore bonvenigis vin – ĉu kiel scivolemulojn pri la afrika agado, ĉu kiel eblajn partoprenantojn de la unua afrika UK, ĉu simple kiel esperantistojn – ĉe la afrika budo en la akceptejo. Tie estis montrataj memoraĵoj por donaco: T-ĉemizoj, notkajeroj, ĉapeloj, flugofolioj pri la sekva UK kaj multaj aliaj interesaĵoj kun la emblemo de la 109-a UK.

Laŭ teksto de Adjé Adjévi en Torino

Internacia Kongresa Universitato iras al Afriko

Kadre de la 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, okazos la 77-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu senditaj al la IKU-sekretario <amri@huji.ac.il>ĝis la 31-a de januaro 2024. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj la Scienca Kafejo (SK). Kandidatoj por IKU-prelego povas proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Eblas proponi nur por la SK, kiu konsistas el pli mallonga (ĉ. duonhora), pli popular-nivela prelego. Bonvolu indiki, ĉu via propono estu konsiderita ankaŭ kiel AIS-kurso, aŭ nur por la SK. Oni planas vivajn elsendojn de la IKU-prelegoj. La

proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan (ĉ. 5-linian) biografieton de la preleganto. Bonvenas proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos esti konsiderataj por la SK. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo (uk.esperanto.net/2024). Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de € 240. Por IKU/AIS-kurso la honorario estos € 300 kaj por SK €120. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troveblas en la retejo de IKU: <uea.org/kongresoj/universitato>. Kiel la rektoro estis nomumita d-ro Élisée Byelongo, de Kongo DR kaj Sud-Afriko.

Fonto: revuo Esperanto

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj:Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.